



Ĉu la Eŭropa Unio povas flankenlasi esperanton ?

Pierre Dieumegard,
majo 2017

Enhavo

1 Eŭropanoj pensas ke sia voĉo pli gravas en sia lando ol en EU.....	3
2 La opinio pri la graveco de niaj voĉoj multe pli varias laŭ la landoj ol laŭ la sociaj grupoj.....	3
3 Same, opinioj pri Eŭropa Parlamento kaj ĝia agado multe pli malsimilas inter landoj ol inter sociaj grupoj.....	4
4 Optimismo pri futuro estas iom korelaciita kun opinio pri pasinto, pli nete inter sociaj grupoj ol inter naciaj grupoj.....	5
5 Eŭropanoj malbone komprenas kaj malbone parolas fremdajn lingvojn.....	7
6 Eŭropanoj malbone komprenas kaj malbone parolas la anglan lingvon.....	9
7 Eŭropa Unio estas paralizita per la lingva problemo.....	10
7.1 Deziroj pri lingvoj estas malsimilaj laŭ la landoj.....	10
7.2 Plejmulto da eŭropanoj deziras komunan lingvon.....	11
7.3 Pli granda plimulto deziras egalecon en traktado de ĉiuj eŭropaj lingvoj.....	11
7.4 La konkludo de raporto EB386 elmontras la oponon.....	12
8 Konkludo : nur disvolviĝo de esperanto povas solvi la kontraŭon, kaj ebligi Eŭropan Union progresi.....	12

14a de aprilo 2017

Antaŭ cent jaroj, la 14a de aprilo 1917, mortis Ludoviko Zamenhof, iniciatinto de esperanto kaj promociinto de demokration en Eŭropo.

« promociinto de demokratio en Eŭropo » ne estas ofta kvalifiko por Zamenhof. Tamen, kiam oni legas iun el iliaj lastaj verkoj, la « Alvoko al la diplomatoj », eldonita dum la jaro 1915, la plej mortiga jaro de la milito, la konkludo estas klara.

*« **memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo, por atingi tian pacon, estas : forigi unu fojon por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭcivilizacia tempo, la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj** ».*

Kiu estas la malsimileco inter demokratio kaj popolismo, sciante ke la popolo estus superrega en ambaŭ ?

La malsimileco fontas el respekto de homaj rajtoj, respekto de minoritatoj, ĉefe etnaj aŭ lingvaj. En ambaŭ kazoj, la plejmulto decidas, sed, kiel skribis Zamenhof pri la lingvo uzota en komunaj aferoj, « tio estas nur poroportuneca cedo de la malplimulto al la plimulto, sed ne humiliga tributo de gentoj mastrataj al gento mastranta ».

*En 2017, granda parto de Eŭropo estas grupigita en Eŭropa Unio, oficiale regata per traktado de Lisbono, kies la dua artikolo indikas : « **La Unio estas fondita sur valoroj de respekto de homa digneco, de libereco, de demokratio, de egaleco, de laŭjura ŝtato, kaj respekto de homaj rajtoj, inkluzive de rajtoj de homoj el malplimultoj.** »*

Por ke demokratio funkcius, necesas ke la popolo, do la tuto de civitanoj, povus montri sian opinion per baloto, post debato kiu estos ebliginta ĉiujn havi opinion klerigita.

La opinio de ĉiu povas esti klerigata per ekkono de faktoj, opinioj kaj teorioj venintaj de aliaj civitanoj. Tio estas la kialo de la demokrata debato : la komparado de ĉies opinioj por finkonduki al komuna decido.

Nuntempe, en 2017, la demokrata debato estas neebla en Eŭropa Unio, ĉar ne estas komuna lingvo. Niaj estroj kune parolas en la angla lingvo, kiu estas tro malfacila por normalaj civitanoj kiuj uzas aliajn lingvojn ĉiutage, kaj kiuj ne kapablas kompreni ĝin efike. Plie, dum diskutado en la angla lingvo, angloparolantoj superas la aliajn homojn, kaj tio kontraŭas la principoj de la Eŭropa Unio. Pro tio, Eŭropo-Demokratio-Esperanto proponas komune uzi la internacian lingvon Esperanto, multe pli facila ol la angla, kaj justa lingvo ĉar ĝi ne favoras neniun genton.

Sed la opinio de ĉiu povas ankaŭ esti klerigata per legado de dokumentoj en sia kutima lingvo, ebligante kompreni pli bone nian mondon, kaj ĉefe Eŭropon.

Eŭropa Unio havas oficon por studi publikan opinion, per esploroj en ĉiuj landoj de EU. Tiu ofico publikigas la rezultojn per la nomo "Eŭrobarometro" (Eŭropa Komisiono) kaj "Parlametro" (Eŭropa Parlamento). Kutime, ĉirkaŭ 30 000 homoj estas demandataj, el ĉiuj landoj de Eŭropa Unio, sed ankaŭ el ĉiuj aĝoj, seksoj, stud-niveletoj, profesiaj grupoj, ktp.

La rezulto de tiuj esploroj, pagita de ĉiuj impostpagantoj de Eŭropa Unio estas interesa por ĉiuj civitanoj de Eŭropa Unio. Ĝi ebligas pli bone vidi ĉu la opinio de nia lando similas tiujn de aliaj lando. Ĝi ankaŭ pli bone komprenigas malkonsentojn inter gentoj.

Malfeliĉe, tiuj raportoj estas tro malbone konataj kaj publikigitaj, interalie ĉar ili ne estas haveblaj en ĉiuj oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio.

En freŝdataj esploroj, la esploro EB451 "la futuro de Eŭropo" havas sian raporton kaj sian kromdokumentojn nur en la angla, germana kaj franca lingvoj¹, dum tiuj lingvoj estas kompreneblaj nur de malplimulto : la futuro de Eŭropo estu ĉies afero.

La esploro Parlametro EB86² estas havebla per sinteza raporto en ĉiuj oficialaj lingvoj, sed la rezultoj laŭ la sociaj kategorioj estas nur en la angla. Kial senigi la plimulton de Eŭropanoj je informoj kolektitaj per ĉies impostoj ? Tamen tiu traduko ne estas malfacila : la frazoj estas simplaj kaj ofte similaj.

Ĉu ni vidu tie la kaŝman manon de iu malbona potenculo, kiu volas plifortigi la povon de iu eta grupo ? Eble, sed tio eble fontas el burokrataj malfaciloj de brusela oficistoj. Por publikigi raporton en iu lingvo, necesas kontroli ĝin en tiu lingvo, kaj certigi ke ĝi havas ĉiujn necesajn permesojn, de ĉiuj servoj.

Pro tio, Eŭropo-Demokratio-Esperanto iniciatis publikigon de tiuj rezultoj, por ke Eŭropanoj pli bone konu siajn opiniojn, je ilia diverseco sed ankaŭ en ilia unueco.

Tio ne estas traduko de dokumentoj jam publikigitaj de Eŭropa Unio. Tio estas rilatigo de tiuj dokumentoj, por nutri demokratian debaton.

Antaŭ 60 jaroj, la traktato de Romo faligis doganajn barilojn. Nun, ni bezonas faligi lingvajn barilojn.

1 <http://ec.europa.eu/COMFrontOffice/publicopinion/index.cfm/Survey/getSurveyDetail/instruments/SPECIAL/surveyKy/2131>

2 http://www.europarl.europa.eu/pdf/eurobarometre/2016/parlemetre/eb86_1_parlemeter_synthesis_fr.pdf

1 Eŭropanoj pensas ke sia voĉo pli gravas en sia lando ol en EU

La esploro Parlametro EB386 demandas ĉu la homo konsentas pri "Mia voĉo gravas en mia lando » (D72.2) kaj « Mia voĉo gravas en Eŭropa Unio » (D72.1).

En aŭtuno 2016, 53 % de la demandataj homoj jesis pri « mia voĉo gravas en mia lando », 10 % malpli ol en 2015. Nur 37 % jesis « mia voĉo gravas en Eŭropa Unio », 2 % malpli ol 2015. Ekde 2009, la rezultoj similas : inter 51 % kaj 63 % konsentas pri « mia voĉo gravas en mia lando », kaj 34 % ĝis 42 % konsentas pri « mia voĉo gravas en la EU ».

Averaĝe, la homoj kontentas pri demokratio en sia lando, sed malkontentas pri demokratio en la Eŭropa Unio.

2 La opinio pri la graveco de niaj voĉoj multe pli varias laŭ la landoj ol laŭ la sociaj grupoj


Anstataŭ kalkuli nur la averaĝo, kiu konsideras Eŭropa Unio kiel sendiferenca korpo, oni povas analizi la opiniojn de grupoj kiuj konsistigas la eŭropa loĝantaro.

En esploroj pri publika opinio, tradicie oni disigas la respondojn laŭ la sociaj grupoj : sekso, aĝo, profesiaj grupoj, stud-niveletoj, ktp.

Ĉi tie, oni povas ankaŭ havi rezultojn laŭ la landoj ; en grafikaĵoj, la kodo estas tiu uzata en raportoj Eŭrobarometraj (vidu bildo 1).

AT Aŭstrio
BE Belgio
BG Bulgario
CY Kipro
CZ Ĉeĥio
DE Germanio
DK Danio
EE Estonio
EL Grekio
ES Hispanio
FI Finnlando
FR Francio
HR Kroatio
HU Hungari
IE Irlando
IT Italio
LT Litovio
LU Luksemburgio
LV Latvio
MT Malto
NL Nederlando
PL Pollando
PT Portugalio
RO Rumanio
SE Svedio
SI Slovenio
SK Slovakio
UK Britio

Bildo 1: Kodoj de landoj por Eŭrobarometro




Bildo 2: Parlametro 2016 : jesaj procentoj pri « Mia voĉo gravas en mia lando » kaj « Mia voĉo gravas en la Eŭropa Unio », laŭ la sociaj grupoj

Oni trovas kutimajn rezultojn : senlaboruloj kaj hejmuloj pensas ke ilia voĉo ne gravas, sed superaj dungitoj, kiuj kutime pridiskutas por decidi, pensas ke ilia voĉo pli gravas. En la centra nebulo, manlaboristoj kaj emeritoj malpli pensas ol junuloj kaj studentoj ke sia voĉo gravas.

Tio estas normala.

Kiam oni faras similan grafikaĵon kun naciaj grupoj, oni vidas ke opinioj estas multe pli diversaj ol inter la sociaj grupoj.



Bildo 3: Parlametro 2016, procento da jesaj respondoj al demandoj D72 : « Mia voĉo gravas en mia lando » kaj « Mia voĉo gravas en la Eŭropa Unio », laŭ sociaj grupoj (ruĝe) kaj naciaj grupoj (verde).

Oni vidas ke la naciaj opinioj estas multe pli diversaj ol la opinioj de sociaj grupoj. Grekoj tre malkontentaj, ambaŭ en ilia lando kaj en Eŭropa Unio : nur 20 % kontentaj. Verŝajne la ĉiamaj problemoj de nacia ŝuldo en Grekio, kaj malriĉigaj politikoj truditaj al greka popolo agas en tiu rezulto.


Aliaj mediteraneaj landoj, Italio kaj Hispanio, estas proksimaj : nur 30 % el la demandataj homoj pensas ke ilia voĉo gravas.

Male, loĝantoj de nord-okcidenta Eŭropo (Danio, Svedio, Finnlando, Nederlando) pensas ke ilia voĉo estas bone konsiderata, same en sia lando kiel en Eŭropa Unio.

Do oni vidas ke ĉiu lando estas « kultura grupo » homogena. En ĉiu lando, viroj kaj inoj, junuloj kaj maljunuloj, manlaboristoj kaj firmaestroj parolas unu la alian, spektas same la televidon, legas similajn gazetojn kiuj montras saman opinion, kaj fin, ĉiuj havas (preskaŭ...) komunan opinion, malsimila je opinio de alia lando. Male, maltrafe estas paroli pri ina opinio kaj vira opinio, aŭ pri opinio de laborista klaso kiuj ne estus tiu de superaj dungitoj, aŭ kontrastigi junulojn kaj maljunulojn. Ĉi-tie, tiuj grupoj montras nur etajn malsimilecojn en iliaj opinioj.

3 Same, opinioj pri Eŭropa Parlamento kaj ĝia agado multe pli malsimilas inter landoj ol inter sociaj grupoj

Tiu Parlametro 2016 demandis opinion pri Eŭropa Parlamento (demando Q3) kaj la deziro aŭ ne pri pli grava rolo de tiu Parlamento (demando Q4).



Bildo 4: procentoj de jesaj respondoj pri demandoj Q3 kaj Q4 de Parlametro 2016

Nur estas malgranda korelacio inter la respondoj de la du demandoj. Kiam oni havas pozitivan imagbilon, oni ofte deziras pli gravan rolon, sed tio ne estas forta.

Kiel antaŭe, manlaboristoj estas maloptimistaj, kaj studentoj estas optimistaj. Sed ankaŭ, kiel antaŭe, la naciaj opinioj estas tre malsimilaj, multe pli malsimilaj ol la opinioj de sociaj grupoj.

Rumanoj kaj Bulgaroj havas pozitivan opinion kaj deziras pli gravan rolon : eble tio venas de la klopodoj de Eŭropa Unio por kontraŭi koruptadon en tiuj landoj. La franca opinio estas malbona pri la Parlamento, sed tamen deziras pli gravan rolon.

Ni povas same klarigi : en iu lando, la homoj ricevas la samajn informojn, parolas unu la alian, diskutas (eble per gazetoj, radioj, televido, Fejsbuko, ktp), kaj, finfine, havas komunan opinion, ebla per la komuna lingvo nacia. Inter landoj, lingvoj estas malsama, kaj komunikado ne eblas : publika opinio evoluas malsame..

4 Optimismo pri futuro estas iom korelaciita kun opinio pri pasinto, pli nete inter sociaj grupoj ol inter naciaj grupoj.


En tiu Parlametro, estas demandoj pri « Nia lando profitis Eŭropan Union » (Q13), kaj « La aferoj iras en bona direkto » (D73.2).

Pri sociaj grupoj, la korelacio estas tre videbla. Studentoj, superaj dungitoj, kaj junuloj havas bonan opinion, sed hejmuloj, emeritoj kaj senlaboruloj havas malbonan opinion.

Sed oni vidas ke naciaj opinioj estas tre malsimilaj, multe pli malsimilaj ol sociaj grupoj.

Italoj estas maloptimistaj, ambaŭ por pasinto kaj pri estonto, sed Irlandanoj, Maltanoj kaj Litovoj estas tre optimistaj.


Pri Britio, ni vidas ke tiu lando profitis la Eŭropan Union, sed la loĝantoj pensas ke aferoj ne iras en



Bildo 5: Demandoj Q13 "Nia lando profitis la Eŭropan Union" kaj D73.2 "En la EU, la aferoj iras en la bonan direkton" (jesaj procentoj, Parlametro 2016)

bonan direkton, eble kun ligo je la referendumo pri briteliro.

En 2016 ankaŭ, la raporto de alia esploro Eŭrobarometro (EB451 « la estonto de Eŭropo ») estas havebla nur en la angla, franca kaj germana lingvoj (ne kompreneblaj de la plimulto en Eŭropo). Estis demandoj pri asertoj « Ĉiuj havas eblecon sukcesi en la vivo » (QB11) kaj « La vivo de niaj infanoj estos pli facila ol la nia » (QB12).



Bildo 6: EB451 "La estonto de Eŭropo" (aŭtuno 2016), demandoj QB11 kaj QB12

Francoj estas aparte maloptimistaj pri la futuro de la novaj generacioj. Grekoj estas maloptimistaj, kaj tio ne estas surprizo, pro la financaj problemoj de Grekio.

Laŭ la landoj, jesaj respondoj pri « la vivo de niaj infanoj estos pli facila ol la nia » varias inter la unuo kaj la kvinoblo. Oni vidas ankaŭ tie que la eŭropaj gentoj ne komunikas inter si, kaj ke la naciaj opinioj estas tre malsimilaj, multe pli malsimilaj ol opinioj de sociaj klasoj.


Se ne estas debato je la nivelo de tuta Eŭropo, kiel ni povas imagi ke estus demokrataj decidoj en Eŭropa Unio ?

5 Eŭropanoj malbone komprenas kaj malbone parolas fremdajn lingvojn

Tiam kaj tiam, la Eŭropanoj estas demandataj pri siaj kompetentecoj kaj opinioj pri lingvoj kiujn ili povus uzi. En 2012, enketo Eŭrobarometro estis « La eŭropanoj kaj iliaj lingvoj » (EB 386).

La raportoj estas haveblaj nur en la angla, la franca kaj la germana lingvoj. La « prilandaj dosieroj », kiuj donas la rezultojn por ĉiuj landoj, estas haveblaj nur en la angla.

Iu demando estis « Kiuj estas la lingvoj, krom via familia lingvo, kiujn vi sufiĉe bone parolas por partopreni interparoladon ? » (D48T). Alia demando estis « Kiuj estas la lingvoj, krom via familia lingvo, kiujn vi sufiĉe bone komprenas por aŭskulti novaĵojn el radio aŭ el televido ? » (SD5a).



Bildo 7: Esploro Eŭrobarometro EB386 « La Eŭropanoj kaj iliaj lingvoj » (2012) : procentoj da homoj kiuj sufiĉe bone konas iun nefamilian lingvon por partopreni interparoladon (D48T) aŭ aŭskulti novaĵojn el radio aŭ el televido (SD5a)

En respondoj de tiuj demandoj, « nefamilia lingvo » ne signifas ĉiam « fremda lingvo ». Ekzemple, en Hispanio, kie vivas multaj homoj kies familia lingvo estas kataluna, eŭska aŭ galega, 16 % el la demandatoj respondas « la hispana », kaj 11 % respondas « la kataluna » kiel nefamilia lingvo, sufiĉe bone konata por interparoladi. Same, en Latvio, kie multaj homoj familie parolas la rusan, 24 % respondas la latvan lingvon.

Tiuj demandoj ne taksas la lingvan nivelon por interparoladi : eble oni jesas kiam oni kapablas iri en vendejo por aĉeti varojn, aŭ alparoli homojn por ludi sur la strando dum ferioj.


La punkto « EU27 » estas la averaĝo de la Eŭropa Unio (27 landoj : tiutempe Kroatio ne estis membro de Eŭropa Unio).

Ĝenerale, la landoj bone « lingvokapablaj » (supre kaj dekstre en la grafikaĵo) estas malgrandaj landoj, kie la loĝantoj nepre devas paroli kun loĝantoj de najbaraj lando. Luksemburgio havas plurajn oficialajn lingvojn, kaj plurlingvan edukistemon. Malto estis regata de Britio dum multaj jarcentoj, kaj tio lasis spurojn en la bona kapablo pri angla lingvo. Litovio kaj Latvio havas bonan konon de rusa lingvo kiel spurojn de ilia dependo de Rusio kaj Soveta Unio.

La landoj malbone « lingvokapablaj » (maldekstre kaj malsupre) estas ĉefe grandaj landoj, en kiu loĝas pluraj dekoj de milionoj da homoj, kaj kie la loĝantoj malpli devas interŝanĝi kaj interparoli kun alilingvanoj.

6 Eŭropanoj malbone komprenas kaj malbone parolas la anglan lingvon


D48T1 : lingvoj kiuj vi sufiĉe bone parolas por interparoli (sume)



Bildo 8: Respondoj de demando D48T, en enketo EB386 "La eŭropanoj kaj iliaj lingvoj" (2012), kompare je simila demando en 2005

Oni konstatas ke malpli ol 40 % de Eŭropanoj kapablas partopreni interparoladon en la angla lingvo, kiel « ne familia lingvo ». Post eliro de Britio, oni povas pensi ke tiu nombro estos plimalpli la tuta procento da Eŭropanoj kiuj kapablos interparoli en la angla lingvo.

Por esti kapabla partopreni debaton, kiu estas necesa por demokrata funkciado de iu politika strukturo, interparoli ne sufiĉas, necesas klarigi opinion per amasinformiloj (gazetoj, radioj, televido...). Tio estas nomita « pasiva kono de lingvoj » en la raporto Eŭrobarometro.



SD5a Kiuj lingvoj, krom via familia lingvo, vi komprenas sufiĉe bone por aŭskulti novaĵojn el radio aŭ televido ?


SD5b Kaj por legi artikolojn en ĉiutagaj gazetoj aŭ magazinoj ?

Bildo 9: Pasiva kono de lingvoj (Eŭrobarometro EB386)

Tiel, oni konstatas ke nur unu kvarono de Eŭropanoj kapablas partopreni demokratian debaton je la nivelo de Eŭropa Unio, ĉar la lingvo pli komuna estas komprenata nur de unu kvarono de la loĝantoj. La tri restantaj kvaronoj estas forigitaj de tiu debato : tio estas granda kvanto, tro granda por strukturo oficiale « demokrata » ».

7 Eŭropa Unio estas paralizita per la lingva problemo

7.1 Deziroj pri lingvoj estas malsimilaj laŭ la landoj




Bildo 10: Procentoj da respondoj favoraj al la ĉina kaj rusa lingvoj, en demando QE1b « kaj kiuj lingvoj lernus la infanoj en la futuro ? »

La esploro EB386 demandis ankaŭ kiuj lingvoj estos instruindaj al la infanoj ; en tiuj lingvoj, estis la rusa kaj la ĉina, ekster la oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio.

Respondoj multe varias laŭ la landoj. Latvoj, Litovoj kaj Estonoj pensas ke la rusa estos utila por ilia infanoj, ial pro la proksimeco de Rusio, kaj ankaŭ pro la granda nombro da rusparolantoj en la lando mem. Ne estas facile kompreni la variemo de proporcioj de homoj kiuj pensas ke la ĉina estos lingvo utila por ilia infanoj.

7.2 Plejmulto da eŭropanoj deziras komunan lingvon




Bildo 11: Procentoj de respondoj al demandoj QE27 (EB386) pri bezono de nefamiliaj lingvoj

Oni konstatas ke granda plimulto (pli ol du trionoj) deziras komunan lingvon por komuniki ene de la Eŭropa Unio, sed la plimulto estas malpli granda por unu lingvo por la komunikado inter la eŭropaj instancoj kaj la civitanoj.

Oficiale, en iu demokratio, la estraro devas provi fari tion kion deziras la popolo. Sed en la nuna praktiko, estas la malo : la eŭropaj institucioj uzas la anglan lingvon por komuniki kun la civitanoj, dum ne estas komuna lingvo por komunikado inter civitanoj.

7.3 Pli granda plimulto deziras egalecon en traktado de ĉiuj eŭropaj lingvoj

QE7. Kiel vi konsentas pri la sekvantaj asertoj ?



Bildo 12: Procentoj de respondoj al demandoj QE7 en Eŭrobarometro 386 « La eŭropanoj kaj iliaj lingvoj »

La deziro de eŭropaj popoloj havi egalecon de traktado inter ĉiuj lingvoj estas eĉ pli nete videbla : pli ol kvar kvinonoj havas tiun opinionon.

La lisbona traktado, kiu estas oficiale la bazo de Eŭropa Unio, indikas en ĝia artikolo 2 « la Unio estas fondita sur valoroj de demokrateco, de egaleco, de respekto de rajtoj de malplimulto... en socio

de plurismo, de ne-diskriminacio », ktp... la regantoj devus konsenti tiun deziron.

7.4 La konkludo de raporto EB386 elmontras la oponon

84 % de Eŭropanoj pensas ke ĉiuj en la EU devus kapabli paroli almenaŭ unu lingvon krom sia familia lingvo, kaj 72 % ke ĉiuj Eŭropanoj devus kapabli paroli pli ol unu fremda lingvo. Tiel, plejmulto de eŭropaj civitanoj konsentas je la celo de Barcelono, kiu diras ke ĉiu eŭropaj civitanoj devus kapabli paroli almenaŭ du fremdajn lingvojn.

La Eŭropanoj ĝenerale deziras ke ĉiuj en la EU kapablu paroli komunan lingvon (69%), kaj eta plimulto el ili pensas ke la eŭropaj institucioj devus elekti ununuran lingvon por komuniki kun eŭropaj civitanoj (53%) ; ili pensas samtempe ke ĉiuj lingvoj en la EU devus esti traktataj sammaniere. Tiu aserto, kiu estas menciita de 81 % de la respondintoj, estas hodiaŭ pli forta ol en 2005.

Bildo 13: Konkludo de la raporto EB386 « La Eŭropanoj kaj iliaj lingvoj »

La konkludo de tiu raporto indikas nete en la sama frazo la dezirojn havi komunan lingvon, sed samtempe havi saman traktadon por ĉiuj lingvoj.

Tiuj du deziroj ŝajnas kontraŭaj. Se oni prenas nacian lingvon kiel komunan lingvon por la tuta Eŭropa Unio, aperas malekvilibro (diskriminacio?) inter eŭropaj popoloj : la denaskaj parolantoj de tiu lingvo estos favorataj rilate al la parolantoj de aliaj lingvoj. Se oni same traktas ĉiujn lingvojn, oni ne povas favori iun el ili por esti komuna lingvo.

8 Konkludo : nur disvolviĝo de esperanto povas solvi la kontraŭon, kaj ebligi progreson de Eŭropa Unio

La internacia lingvo Esperanto estas konceptita specife por tiu celo : justa komunikado inter homoj de malsamaj familiaj lingvoj.

Ĝi estas justa, ĉar ĝi ne estas propraĵo de iu eŭropa gento : neniu estas favorata nek malfavorata.

Ĝi estas pli facila ol la tradiciaj lingvoj. Ĝia lernado ne malebligas lerni aliajn lingvojn, krome. Male, lerni esperanton plifaciligas la postan lernadon de aliaj lingvoj.

Ĝi estas pli preciza ol multaj tradiciaj lingvoj. La gramatika strukturo de la frazoj malebligas multajn erarojn de kompreno, ĉefe kiam necesas pluraj tradukoj sinsekve, uzante iun lingvon kiel pontolingvo inter du lingvoj malmulte uzataj.

Eŭropo-Demokratio-Esperantoo
9 rue du Couradin,
35510 Cesson-Sévigné (Francio)
contact@e-d-e.org
<http://e-d-e.org>

Pierre Dieumegard —



Libera dokumento, kun licenco CC by-sa —
<http://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/fr/>
havebla ĉe
http://e-d-e.fr/IMG/pdf/broshuro2017_eo.pdf